PENSEO

N-ro 109

NOV./2000

Monata Beletra Revueto en Esperanto

Honorita de Premio Grabowski,1994

Fondita en 1990;Enretigita en 1997 www.crosswinds.net/~zfmao/penseo

MIKRONOVELO

KONTRAŬAĴO

Wan Gang

Revenante de sia hejmloko al la provinca ĉefurbo, ŝi kunportis sian fileton kaj amason da pakaĵoj. Malsuprenirinte la vagonaron, ŝi baraktis sub la pezo de la fileto kaj tiuj aĵoj. Junulo, aspektanta kiel oficisto, heziteme elbuŝigi la vortojn, "Ĉu vi volas mian helpon, mi havas kuraĝon demandi al vi?"

"Bonege ja!" Ŝi, kun granda volonto, tuj metis la fileton en la sinon de la junulo.

En la homfluo, ili iris kaj iris, ŝajne iris longan vojon por eliri la stacidomon.

"Dankon!" ŝi diris, post kiam ili staris ekster la stacidomo.

"Ne gravas." La junulo redonis al ŝi la fileton. "Nu, kiel forte vi tenas min je la vesto…" Li senkonscie glatigis la de ŝi ĉifritan baskon de sia eŭroptipa jako.

Ŝia vizaĝo ekruĝiĝis. Malgraŭ ke la junulo iris tre foren, ŝi ankoraŭ sentis varmegon sur la vangoj.

Ververe, sur la "longlonga" vojo kondukanta al la stacidomo, ŝi ĉiam subkonscie maltankviliĝis: ĉu la junulo estas trompanto aŭ hom-vendisto… Do ŝi tenis lin je la jakbasko sen lasi sian manon.

Kiel ĵurnalistino, kiu ŝatis verki poemojn, ŝi veis kontraŭvole: "Nuntempuloj havas kontraŭaĵon. Ili sopiras al la fido kaj tenera sento inter homoj, dume ili ĉiam ĵetas singardan kaj dubeman rigardon al ĉio ĉirkaŭ si…

Ĉu mi ne kondutas tiamaniere? Ŝi pensis.

(el la ĉina: Hongjia)

⌂⌂⌂⌂⌂⌂⌂⌂⌂⌂⌂⌂⌂⌂⌂⌂⌂⌂⌂⌂⌂⌂⌂⌂⌂⌂⌂⌂⌂⌂⌂⌂⌂

ĈINAJ MODERNAJ POEMOJ

Adiaŭado

Xi Murong

ne ĉiuj songôj
laŭvole realiĝos
ne ĉiujn vortojn
mi al vi diros laŭdezire
rimorso ĉiam radikiĝos en la koro post disiĝo
kvankam asertas oni
ke ĉiaĵoj en la mond' finfine neniiĝos


ne decideme mi intencas perterlasi
sed
mi ĉiam faras tion
por preterlasi hieraŭon plenan je florbranĉoj
kaj ankaŭ
hodiaŭon

hodiaŭ reaperos la disiĝo sama
fremduloj ni fariĝos ekde tiam
aparte je mil lioj* unu de alia

en krepusk' profunde mi la kapon klinas
al vi
bonvole
pri vi mem zorgu por mia bono
kvankam asertas oni
ke ĉiaĵoj en la mond' finfine neniiĝos

*ĉina unuo por mezuri distancon (=1/2 kilometro)

elĉinigis Lao San



Erarvagado

Bei Dao

laŭ fajfado de kolombo
mi vin serĉas
altaj arboj baras mian vidon al ĉielo
sur vojeto
leontod' erarvaganta
min kondukas al la blua-griza lago
en spegula bild' enakva flagretanta
mi vin trovas
la okulojn nesondeblajn

☺ Ĉina Fablo ☺

Avantaĝo

Ning Xi

Aŭdinte ke Anaso, Kokino kaj Bovo interparolas pri siaj propraj avantaĝoj, Rano paradaĉas fiere al ili kaj diras, "Hej, vi diras, ke vi havas viajn proprajn avantaĝojn —— bone, kian avantaĝon vi havas, Anaso?"

"Naĝado."

"Ha, nemenciinde! Kaj vi, Kokino?"

"Demetado de ovoj."

"Demetado de ovoj? Estas ankaŭ ordinare. Kaj vi, Bovo?"

"Terplugado."

"Ve, tiel vulgara. Ĉu vi ne povas fari ion elegantan?"

Tuj kiam li finas sian parolon, Rano vidas Ĉevalon prokisimiĝi kaj demandas al tiu, "Hola! Kian avantaĝon vi havas, Ĉevalo?"

"Tirado je ĉaro. Se eksplodos milito, ni portos surdorse la batalantoj al batalkampo por mortigi malamikojn."

"Ba! Tio ankaŭ ne indas je mencio…"

Aŭdinte tion, Ĉevalo demandas al Rano, "Do kio estas via avantaĝo, D-ro Rano?"

"Komentado," diras Rano. "Mi komentas viajn avantaĝojn."



(el la ĉina: Dura)

♠♠♠♠♠♠♠ ♠♠♠♠♠♠♠♠ ♠♠♠♠♠♠♠

EL 《*LAŬZI*》

ĈAPITRO VII

Eterna estas la Ĉielo kaj eterna estas la Tero.
La kaŭzo, kial ili estas tiaj,
Kuŝas en tio, ke ili ne ekzistas por si mem,
Kaj pro tio ili povas daŭri por ĉiam.
Tial la Saĝulo metas sin en la lastan lokon,
Sed efektive Li ĉiam staras plej antaŭe.
Havante nenian konsideron pri si mem, Li bone sin konservas.
Ĉu ne ĝuste pro sia sinforgeso
Li povas perfekte plenui siajn privatajn celojn?

ĈAPITRO VIII

La supera bono estas kiel akvo.
La akvo nutras ĉiujn estaĵojn kaj ne konkuras kontrraŭ ili.
Ĝi loĝas en lokoj, kiujn la homoj evitas,
Kaj tial ĝi estas plej proksima al la Taŭo.
Do preferu loĝejon modestan,

Havu en la koro sentojn profundajn,
Estu intimaj al viaj amikoj,
Tenu ĉiam viajn promesojn,
Sekvu bonan ordon en regado,
Estu kapabla en traktado de aferoj,
Sciu uzi la okazon en agado.
Ĝuste pro nenia konkuro
Nenia miso estas farata.

ĈAPITRO IX

Estas preferinde demeti vazon jam ĝisrande
plenan,
Ol plu ĝin manteni kaj fari enverŝadon.
La klingo, kiu estas tro akre forĝita,
Ne povas longe konservi sian akrecon.
Se la domo estas plenplena de oro kaj jado,
Ili ne povas esti tenataj en sekureco.
Esti fiera pri sia riĉeco kaj honoro
Signifas kaŭzi al si ruiniĝon.
Retiriĝi tuj post plenumo de la granda laboro,
Jen la leĝo de la Ĉielo.

Ĝui Printempan Feston en Wuhan

Otto Nitsche (Germanio)

En la venontaj tagoj mi gastis en la hejmo de plejjuna frato de Jariĉ, en la hejmo de ĵurnalisto s-ro Peng Zhengming. (eĉ en 1999 li estis gasto en nia hejmo en Duisburgo, kaj en la hejmo de nia filo loĝanta en Berlin) mi gastis en la hejmo de s-ino Wang Diling, kaj en la hejmo de fraŭlino Wana Xia, kiu troviĝis norde de la urbo 150m for de la Jangzi digo. Mi biciklis kun Jariĉ en belega regiono de Orienta Lago, veturis per busoj, pramo kaj promenadis en parkoj. Post kelkaj tagoj Jariĉ informiĝis, ke nun ĉambro kun hejtilo estas preta por mi. "Mi restas en via familio, eĉ perforte mi ne pretas translokiĝi," mi respondis. Ho, mi memoras. Vespere, antaŭ enlitiĝo ĉiam estis granda ceremonio. Mi sidiĝis sur seĝo, forprenis miajn strumpojn kaj Jariĉ alportis grandan pevlon de varma akvo. Jariĉ diris: "Otto, vi estas la lasta imperiestro de Ĉinio. Kun ĝojo mi regalis kaj servas vin. Bonvolu varmigi viajn piedojn, por ke vi profunde kaj bone dormu!" Liaj familianoj iam gaje observis ĉi tiun spektaklon. Mi sentis min kiel reĝo. Ho, mi preskaŭ forgesis diri. Ĉiam en frua mateno mi ne estis vekita de ĉarma filino de Jariĉ, sed sonora bleko --- la koka krio vekigis min. Verŝajne ĝi sidis en kaĝo trovante je la balkono.

Jariĉ kun edzino kelkfoje telefonis al oficejo de urba registaro, por ke oni akceptu min. Mi venis al Wuhan kiel unua delegito (pro 10-jara datreveno de urbĝemeliĝo) de nia urbo kaj de nia urbestro s-ro Josef Krings, transdonante leterajn bondezirojn kaj salutojn al la urbestro de Wuhan registaro s-ro Zhao Baojiang. (Telefonaj klopodoj ke oni oficiale akceptu min sukcesis.)

Je la 13-a Februaro mi kun miaj gastigantoj --- Jariĉ kun edzino --- estis gastoj de la Wuhan registaro. En la mateno oni ŝoforis nin al la nova ĉefstacidomo kaj al pliaj vidindaĵoj. Ankaŭ ni rigardis la registaran kvartalon. Tagmeze ni lukse manĝis en loĝejo de s-ino Shao Rongxia. Estis tagmanĝo konsistanta el 16 pladoj. Ni estis en hela, granda loĝejo bone ekipita per blankaj mebloj. Ŝia filino --- mi interparolis kun ŝi helpe de interpretisto --- havas propran televidsekcion pri literaturo por infanoj kaj gejunuloj. Posttagmeze mi havis oficialan akcepton de la urba registaro. S-roj Liu Gansheng kaj Tian Keqing bonvenigis min transdonante al mi bildlibron de Wuhan. Kaj

mi prelegis pri la urbo Duisburg kaj per grandaj bildoj mi klarigis produktojn-maŝinojn, kiuj estas faritaj de Mannesmann entrepreno. S-ro Xu Kangrong interpretis. S-ro prof. Wang Shen dankis pro mia prelego transdonante donacon al mi. Vespere ni bone estis regalita de la dommastrino de s-ro Xu Kangrong. Impresis min lia 10-jara filo kiu perfekte regis altrangan arton de kaligrafio. Do, mi havis multajn interparolojn. Estis vere neordinara interesa tago konatiĝi kun ĉarmaj homoj, kun altrangaj oficistoj, lerni pri fremdlanda kulturo, lace, sed plena de multaj travivaĵoj ni malfrue revenis al mia hejmeca loĝejo.

Kaj ni estis en la hejmo de s-ro Wang. Ŝajnis al mi ke li estas riĉa. Okope ni per aŭto estis veturigita al luksa dancejo. Tie mi dancis kun ĉiuj virinoj de nia grupo. Kiel laste mi havis honoran dancon kun mia dommastrino s-ino Wan Difang, kaj mi lernis ludi "hazarda-ludon" kaj frato de Jariĉ preparis por mi kaj miaj familianoj belaspektan afiŝon kaligrafe skribita pro Novjaro. Mi ricevis unikan donacon --- stampiloj de kaligraf-faranto kun la nomoj de Otto-Rita kaj niaj filoj Andreas kaj Christian Nitsche. La donacoj estas unika en la mondo, kaj farita el jado.

Ne eblis raporti pri ĉiuj travivaĵoj havante en Wuhan. Je la 15-a Februaro venis tago de adiaŭo. Dankon al ĉiuj kiuj akompanis min dum promenoj, kiuj invitis min, do speciale mi dankas al Jariĉ, al lia ĉarma edzino kiu bonege regalis min. Estis mia plej interesa vojaĝo dum mia vivo, danke al Esperanto, lingvo de justeco kaj koreco. En la avidilejo ni kore kaj sincere adiaŭis unu la alian. En Beijing atendis min s-ro Lu Binsheng. Tie mi spertis pri Lanterna Festo. Alveninte hejme mi raportis al nia urbestro s-ro Josef Krings kaj al estro pri ĝemelurbaj rilatoj s-ro Holger Drasto pri mia vojaĝo transdonacante bondezirojn de Wuhan registaro. Oni dankis per la vortoj: "Vi s-ro Nistche estis bonega reprezentanto de nia urbo. Dankon!"

Aldona Noto: Mia amiko Jariĉ estis aliĝinta al 84-a UK en Berli 1999. Ĉiuj necesaj dokumentoj estis pretaj. Do, informo pri kancero trafis min kiel glavo enirante koron. Jen vortoj el lasta letero veninta el Wuhan je la 12-a Junio 99 --- Kara Otto... mi larmis leginte ke mi estas via plej intima amiko, laŭorde pli grava ol la propraj fratoj.

Je la 3-a de Septempro 1999 "Verda Stelo" bonanima, pacama, justeca paliĝas. Nia kara amiko Jariĉ restas ĉiam en bona rememoro. Dankon pro ĉio, kondolencon al la tuta familio Wan Difang. Al la familio restas multaj fotoj bone ordigita en albumo. La fotoj atestas "nian vivon" inter diverskulturaj familioj. Esperanto --- riĉigas mian menson, mian pensmanieron kaj la ĉiutagan vivon. Ĝi estu lingvo de justeco kaj bonkoreco!



****

Eldonas Guangdong-a Esperanto-Asocio
Adreso: s-anino Harpina WU
Poŝtkesto 136, Jichang-xi,
Guangzhou, Ĉinio, CN-510403
E-poŝto: harpina@21cn.com
POŜT-KUPONOJ ESTAS BONVENAJ!
…………..
Ĉefredaktoro: s-ro Yida Wei (Vejdo)
Adreso: Fremdlingva Fakultato, Shantou Universitato,Guangdong515063, Ĉinio
Tel: (0754) 2903012 (hejme)
E-poŝto: wyd168@21cn.com
Ĉiujn kontribuaĵojn al la ĉefredaktoro.
****